

Ambicia sempatologia verko de P. Neergaard

La mondfama sciencisto, prof. *Dr. Paul Neergaard*, la direktoro de Dana Ŝtata Instituto por Sempatologio, verkis anglalingvan libron *Seed — a horse of hunger or a source of life?* (Semo — ĉu portanto de malsato aŭ fonto de vivo?).

Eldonis ĝin en 1985 *University of Mysore* (Universitato de Majsur, Hindio). La reviziita represaĵo aperis en 1986.

La 174-paĝa verko estas dividita en 6 ĉapitrojn kun abundaj ilustraĵoj (fotoj, mapoj, grafikaĵoj, tabeloj). Fermas ĝin riĉa referenc-listo kaj zorge kompilita indekso.

La sciencan publikon sendube interesos ne sole la sempatologia sed ankaŭ la scienc-komunikada problemaro. Pri tiu ĉi traktas la 6-a ĉapitro: *Language Barriers and Corrosion of Communication in Science* (Lingvobaroj kaj komunika korodado en scienco). Apogante sin sur seriozaj statistikoj, prof. *Neergaard* pravigas la solvon per la neŭtrala lingvo Esperanto.

Ĉiu SR-leganto, kiu deziras interveni ĉe sciencaj institucioj plede por Esperanto, devus detale konatiĝi kun la grava ĉapitro en la libro de prof. *Neergaard*.

J. Kavka

Gerhard Kalckhoff: 80

Kun apartaj estimo kaj dankemo mi venas por memorigi la SR-legantaron pri la ĉi-jara vivjubileo de nia kara kolego-estrarano.

Dr. Gerhard Kalckhoff naskiĝis la 3-an de aŭgusto 1907. Kiel 17-jarulo li eksciis pri Esperanto kaj aĉetis lernolibron. Ekde 1926 ĝis 1932 li studis fizikon, matematikon kaj filozofion en Universitato de Berlino. La doktorecon de filozofio li akiris per disertaĵo fizika. Poste li laboris dum 40 jaroj ĉe la firmo *Siemens* sur la kampoj de telekomunikado kaj komputado.

Sian veran esperantiĝon li datas ekde 1948, kiam li lernis la lingvon dum 14-taga feriado. En 1951, dum la munĥena Universala Kongreso li havis okazon por ekzerci sin en parolkapablo. Tie li konatiĝis kun *Dipl.-Ing. Rudolf Haferkorn*, tiama delegito de ISAE kaj gvidanto de la germana ISAE-filio. Sekvis longjara korespondado inter ambaŭ kolegoj pri terminologio, precipe de la fako telekomunika. Post kiam d-ro *Kalckhoff* eklaboris en la sekcio por komputado (ĉe *Siemens*), akademiano inĝ. *Haferkorn* stimulis lin al kreado de fakkoncernaj terminoj kaj difinoj. Sur ĉi kampo disvolviĝis fruktodona kunlaboro inter *Kalckhoff* kaj la brita fakulo *Antony C. Pick*, kiu liveris la anglalingvajn terminojn kaj esperantlingvaj difinojn. La komuna ellaboraĵo migris al Terminologia Centro de ISAE, kies direktoro tiam estis akademiano *Ing. Auguste Broise*, la posteulo de *Haferkorn*. *Broise* aldonis la terminojn franclingvajn.

Ekde 1966, *Kalckhoff* estas delegito de ISAE por Federacia Respubliko Germanio kaj gvidanto de la landa ISAE-filio, kiu nun havas 30 membrojn.

Jen mi dediĉu — kadre de la biografio pri *Kalckhoff* — iom abunde da atento al Terminologia Centro de ISAE. Ja okaze de la centjara Esperanto-jubileo denove aktualiĝas urĝeco de la terminologia institucio.